



8-6-1974

CGC N°
00406 504/1000-06

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA - DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 - AP. 73
Telefone 4-8033
11.100 - Santos (SP)

SECRETARIA

Caixa Postal 07 - 1182
Telefone 42-9090
70.000 - Brasília (DF)

AGOSTO DE 1979

ÓRGÃO OFICIAL DO BKE

BOLETIM N° 47

Redação: MARIA ALMADA

LA 64-A U.K. EN SVISLANDO

Okazis de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto pasinta en la belega urbo Lucerno, Svislando, la 64-a ĉijara Univer-sala Kongreso de Esperanto.

Ĝia alta protektanto estis S-ro Hans Hürlimann, federacia prezidanto de la Respubliko.

En tiu vere ĝardena urbo kolektiĝis pli ol 1700 geesperantistoj el ĉirkaŭ 42 landoj.

La solena malfermo de la UK okazis en la impona kongresdomo de Lucerno. Post la aŭskulto de la nacia himno kaj salutvortoj de la prezidanto de UEA, D-ro Humphrey Tonkin, sekvis la salutparoladoj de la naciaj reprezentantoj, inter kiuj troviĝis ankaŭ la brazila, S-ro Othon Amaral, kiu en la nomo de la ambasadoro de Brazilo en Svislando, reprezentis Brazilon.

La prezidanto de BKE, s-ro F. S. Almada, ricevis leteron de la ambasadoro D-ro Carlos Sylvestre de Ouro Preto, sciigante al la brazilaj ĉeestantoj (18) pri la nomumo de tiu reprezentanto.

S-ro Othon Amaral estis akceptita de la brazilanoj ĉe la stacidomo fervoja kaj kune kun ili sin direktis al la kongresejo. La salutparoladon de s-ro Amaral tradukis esperanten prof-ro Sylla Chaves, prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo, indikite de la direktorino de UEA, S-ino Ursula Grattapaglia.

La solena malfermo finiĝis ĉarme, ĉar la infankongreseto aperis sur la podio kaj

D-ro Tonkin intervjuis la infanojn, elmontrante la kapablon de tiuj novaj gesamideanoj.

La japana kongresa karavano donacis du pupojn al UEA.

La ĉeftemo de la kongreso estis: "La lingva aspekto de la internacia organizo", sed la plej detale debatita temo estis la ŝanĝo de la statuto de UEA.

La prelegoj, konferencoj kaj debatoj viciĝis de la 7-a matene ĝis la 8-a vespere senĉese. Tiel la kongreso gajnis burokratecan karakteron.

Dum la landaj reprezentadoj, en la nomo de la Kultura Kooperativo de Esperantistoj, parolis s-ro Carlos A. S. da Cunha kaj en la nomo de Brazila Esperanto-Ligo, ĝia prezidanto Sylla Chaves.

Ĉe la kunveno, kiu pritraktis la "Parlamentan Agadon", rikoltis aplaŭdojn s-ro Carlos A. S. da Cunha, komunikinte la intereson pri Esperanto fare de la brazilaj parlamentanoj. Malmutaj landoj havas kiel ni senatanon esperantistan, temas pri D-ro José Lins de Albuquerque, kies edzino ankaŭ bone scipovas Esperanton. Parlamentanoj, kiuj aprobas Esperanton: Athié Jorge Coury, Freitas Nobre kaj aliaj.

La landajn geesperantistojn akceptis por speciala kocktelo la urbestro de Lucerno, al kiu ĉeestis la brazilanoj, inter kiuj troviĝis la geedzoj Almada kaj Grattapaglia.

Post la parolado de la urbestro, kiu prezentis la urbdomon al la kongresanoj, elstarigante ĝian belecon, respondis D-ro

Tonkin, elegante, lin salutante kaj subtrekis, ke en tiu malnova urbdomo la kvin kontinentoj estas reprezentataj de esperantistoj, kaj ke tiu fakto ankaŭ estas belega.

Antaŭ ol retiriĝi la oficisto de la Urbdomo ofertis glason da vino al ĉeestantaro, kiun ni trinkis je sano de la olda Urbdomo de Lucerno...

Ĉe la solena fermo de la UK la prezidanto de UEA rimarkigis kun bedaŭro, ke nek ONU nek UNESKO sendis reprezentanton ĉijare al UK en Svislando.

Estis elektitaj du honoraj membroj de UEA: S-ino Emilia Lapena, el Jugoslavio kaj D-ro Hideo Shinoda, el Japanujo.

Dank'al prestiĝo de S-ino Fany Dupré la svisa radio sendis raportiston al Lucerno por intervjui la brazilanojn. Li intervjuis ĉiujn membrojn de la delegitaro kaj promesis disradii plurfoje al Sud-Ameriko kaj Afriko.

UEA decidis donaci la japanajn pupojn al "Bona Espero", D-ro Tonkin afable ofertis ilin al la orfoj de tiu organizajo.

La pupojn transprenis nia vicprezidanto D-ro Enivaldo Alves Silva kaj lia ĉarma edzino Maria Lucia por poste transdoni ilin al "Bona Espero".

Fine ni deziras mencii la bonan agadon de la LKK-anoj. Ili ĉiuj loĝas for el Lucerno, sed klopodadis helpi al ĉiuj partoprenantoj dum la tuta kongressemajno, laŭeble pli bone, kvankam ili mem ne sufiĉe konis la urbon.

Tamen inter ili oni devas elstarigi kelkajn nomojn, kiel, de s-ino Gertrud Eggenberger, s-ro Ernest Glättli kaj ges-oj Ines kaj Hans Hunkeler.

Malgraŭ la fortostreĉa laboro ĉe la ĝiĉetoj, s-ano Glättli kaj ges-roj Hunkeler, prizorgis la oficialan Postkongreson en Interlaken, kiu estis neforgesebla.

En la Studenta Hejmo prizorgis la kongresanojn S-ino Gertrud Eggenberger. Tie loĝis kaj manĝis la tiel nomata "Tria mondo", ne pagpova popolo svarmis, ĉirkaŭ 150, en tiu frateca loĝejo.

S-ino Eggenberger ĉiam afable, atente kaj amike klopodis helpi al ĉiuj ni. Dank'al ŝia zorgemo la esperantistaro komforte gastigis tie.

Nia kara s-ino deĵoris dematene ĝis vespere, ĉiam afable kaj orde. Ofte ŝi ne havis tempon eĉ por manĝi, ĉar ŝi ĉiujn

klopodis zorge flegi. Ŝia nomo ne aperis en la kongreslibro, nek ŝi havis tempon aperi ĉe la fermo de la UK, sur la podio, por rikolti la meritindajn aplaŭdojn, kiel la aliaj LKK-anoj, sed ŝi ne restis forgesita ĉar restos en la memoro kaj en la koro de tiuj, kiujn ŝi amike prizorgis.

Al S-ino Gertrud Eggenberger, s-ano Glättli kaj ges-roj Hunkeler, pro ilia bonfaro kaj amikeco ni esprimas nian elkoran dankon.

- x - x - x - x - x -

LA 65-a UNIVERSALA KONGRESO

Ĝi okazos en Svedio — Stockholmo, en la venonta jaro.

Post la ĉijara "tradicia" UK la svedaj gesamideanoj promesis organizi kulturen UK'on en Stockholmo.

Sed dum tiu UK okazos balotado de UEA kaj certe la evento iĝos denove burokrateca.

La esperantistaro klopodas diveni, sugestoj kaj precipe trovi taŭgan prezidanton por UEA. La tasko ne estas facila, ĉar oni iom frostas pro la respondeca laboro, kiun la titolo alportas.

Laŭŝajne oni serĉos taŭgan personon en la "Tria Mondo", kaj ni estu preparitaj por ebleco de surprizo.

- x - x - x - x - x -

LA 66-a UNIVERSALA KONGRESO

Deĵorante dum kelka tempo en la salono de la kongresejo ni surpriziĝis pro la granda intereso vekita pri nia UK, okazonta en 1981.

La unuaj enskribiĝintoj estas niaj karegaj, ne nur samideanoj, sed amikoj el Matosinhos, la geĉdzoj Fernando Costa, kaj el Coimbra, s-ano A. R. Correia, Portugalio. Ni ĝojis ĉar ili estis la unuaj apogoj nin kaj s-ano Costa promesis propagandi pri nia kongreso en Portugalio kaj eblas organizi karavanon, aldonis li.

La tasko de nia LKK ne estas facila kaj esperantistaro en nia lando klopodu perfektigi sian scipovon pri la internacia lingvo. Estos necese senĉesa deĵorado de bone parolantaj, ĉar kiel diris s-ano Stöp-Bowitz "kiu ne parolas la hispanan aŭ Esperanton ne iru al Sud-Ameriko", ĉi

tie la angla, franca kaj germanaj lingvoj malmulte helpas.

- x - x - x - x - x -

LA 14-a SEMINARIO EN UBERABA (MG)

De la 19-a ĝis la 22-a de julio pasinta la Kultura Kooperativo de Esperantistoj organizis sian jaran Seminarion, kiun partoprenis ĉirkaŭ 300 personoj el diversaj ŝtatoj.

La organizadon de la Seminario prizorgis en Uberaba s-ino Maria Julia Junqueira da Cunha, kiu aktivigis la tutan sian familion por helpi la loĝigon kaj programon en la Filozofia Fakultato FISTA.

Krom niaj gesamideanoj, venis reprezentantoj el Usono, Germanio kaj Japanio. Ĉe la solena malfermo la urbestron, D-ro Silverio Cartafina Filho, reprezentis ŝia ĉarma edzino, s-ino Terezinha. Ŝi faris belegan festparoladon en portugala lingvo. Inter alie ŝi diris: "La homoj devas unuiĝi kaj tio eblas pere de la lingvo universala".

La seminarion partoprenis la tuta direktoraro de BKE kaj multenombro ĉeestis ĝin niaj vicprezidantoj.

Krom D-ro Braz Cosenza, prezidanto de la Kultura Kooperativo de Esperantistoj parolis la prezidanto de Brazilia Konsilantaro de Esperanto, prof-ro F. S. Almada, prof-ro Nelson Pereira de Souza, ĝenerala sekretario de BKE kaj ano de la L.K.K. por la 66-a UK, prof-ro Geraldo Matos, prof-ro Walter Francini, prof-rino Elvira Fontes, D-ro Giuseppe Grattapaglia, ĉefdelegito de UEA, prelegis D-ro Carlos Lima Melo kaj aliaj elstaraj esperantistoj el diversaj ŝtatoj.

El Rio Grande do Sul, D-ro Modesto Belmonte de Abreu faris elstaran paroladon. La malfermo finiĝis pere de kanto de la Espero.

Kiel ĉiujare, la junularo organizis muzikfestivalon kaj laŭ la informo de nia vicprezidanto pri tiu fako, André Luiz Fausto de Souza, la 1-an premion gajnis la kanzono "Homa Misio", de Francisco Chagas kaj Marcos Moura - Cr\$ 1.000,00 (donacitan de Brazilia Konsilantaro de Esperanto); la 2-an premion: "Homa Rajto", de la samaj aŭtoroj (donacitan de la partoprenantoj de la Seminario); la 3-an premion gajnis la kanzono "Feliĉo", de Alvaro kaj André Luiz F. de Souza (dona-

citan de Bahia Esperanto-Asocio).

La tria junulara renkontiĝo okazos de la 23-a ĝis la 27 de januaro, 1980, en Sorocaba.

La junularon invitis la Sekretario pri Edukado de Sorocaba, kiu patronos la renkontiĝon, helpe de la urbdomo.

Aliĝkotizo estas: - de septembro ĝis la fino de novembro Cr\$ 300,00; post tiu dato, Cr\$ 400,00.

La kasisto estas Pedro Roman Sanchez, Caixa Postal n^o 234 - CEP 18.100 - Sorocaba (SP), pere de ĉeko pagebla en Sorocaba aŭ poŝtmandato.

En la kadro de la renkontiĝo estos prezentataj la plej belaj muzikoj de la tri festivaloj.

Gejunuloj, aliĝu amase!

- x - x - x - x - x -

LA 1-a KONGRESO DE BRAZILA KONSILANTARO

Estis decidite, ke la Brazilia Konsilantaro de Esperanto okazigos sian unuan kongreson en la venonta jaro. Ĝi estas programita por studado kaj praktikado de Esperanto.

Ĝi okazos en la bela kaj progresema urbo de Juiz de Fora (MG), kies Federacia Universitato instruas Esperanton jam de kelka tempo, sub la gvido de nia vicprezidanto Mag. José Passini.

La brazilaj esperantistoj devas sin prepari por la 66-a UK okazonta en Brazilja, en 1981.

Ni observis la malfacilaĵojn dum UK en Lucerno kaj en aliaj kunvenoj. La esperantistoj tre malbone prononcas la internacian lingvon. Se iu ne esperantisto aŭskultas fuŝan paroladon, certe atribuos al la lingvo mem, li trovos Esperanton neprononcebla kaj teda. Tiel la propagando de la lingvo iĝas malfacila.

Krom tio, multaj timas paroli ĉar hontas erari, nu ni dediĉas la kongreson de BKE al la klarigo, helpo kaj instruado de la lingvo.

Estas vere, ke ni apartenas al la malriĉa "Tria Mondo", tamen ni klopodu esti la plej bonaj en la lingvo-scio kaj prononcado.

Ĉu ni esperantistoj volas antaŭenigi nian lingvon aŭ ne? Estas la demando! Se jes, estas nia devo prezenti la lingvon al

neesperantistoj pere de korekta prononcado. Klopodu ni prononci Esperanton - esperante, paroligi la neesperantistojn. Estas nia unua tasko.

- x - x - x - x - x -

SCIIGO INTERESA

Kultura Kooperativo de Esperantistoj informas nin, ke aperis la revuo Kooperativismo, kies prezo estas Cr\$ 50,00. Krome, ĝi iĝis organiza komitato en Brazilo de la venontjara Pan-Amerika Kongreso en Argentino.

Eblas enskribiĝi pere de KKE, Interilatoj turnu vin al KKE - Caixa Postal Nº 1887 - 20.000 - Rio de Janeiro (RJ).

- x - x - x - x - x -

1979 - INTERNACIA JARO DE LA INFANO

En la kadro de la 64-a UK, en Lucerno, estis organizita denove infankongreso. Ĝin partoprenis ĉikaŭ 20 infanoj. La Kongreseto celas eduki infanonjn al internacia amikeco per aplikado de la komuna lingvo Esperanto.

En Brazilo pluraj esperantistoj dediĉis sian laboron al la Internacia Jaro de la Infano.

D-ro Ivo Sanguinetti organizis mirindan ekspozicion pri tutmonda infandeseĝnajoj en Marília.

D-ro Arnaldo Vianna pere de bela poeziaĵo diris:

"Vi estas bela infanar'
de la ĝardeno de la vivo vi estas florarl
Vi estas de l' vivo la ĉarmo,
ĉar via anĝela rideto ĉe povas sekigi larmon;
Vi estas pura infanar',
La espero de l' Homar'!



MONO RICEVITA POR LA BULTENO

Ni kore dankas la helpon de la jenaj gesamideanoj:

Antonio Rodrigues da Silva	Cr\$ 200,00
José Saraiva Matos	100,00
Onias de Almeida	200,00
Luiz Alberto Coelho	100,00
Sirio Silva	100,00
Venâncio Henrique Dionisio	30,00
Manoel Borges dos Santos	250,00
Maria Almada (esperantaĵoj)	200,00
Fany Dupré	500,00
Claudio Zimmermann (jul-ago)	200,00
Amaro Pinangé Soares	500,00
Luiz Mario S. Silva	200,00
Virgilio Vitoriano	100,00
Delio Pereira de Souza	500,00
Sumo	3.180,00

GAZETOJ RICEVITAJ

ZET - el Jugoslavio, Correio Fratarno do ABC, O NO'SSO, A Candeia, Jornal do Touring, O Líder, Integração, La Lampiro, Jornal da Manhã, Diário Popular, O Monitor, S.E.K. de Sorocaba, A Nova Era, Impulso, Esperanto, Notícias kaj Budhana Kuriero.

- x - x - x - x - x -

DESTRUINDO A TORRE DE BABEL

Este é o título de mais um trabalho do nosso vice-presidente Paulo Amorim Cardoso, feito em português. Está sendo vendido a Cr\$ 30,00 na Universidade Federal do Ceará, Caixa Postal nº 1221 - CEP 60.000 - Fortaleza (CE). Ni dankas la donacon.

- x - x - x - x - x -

CONCURSO DE TROVAS

Promovido pela Associação Paulista de Esperanto será realizado um concurso de trovas, quer em português, quer em Esperanto, para homenagear o Ano da Criança. Cada concorrente poderá apresentar até 5 trovas. Deve escrevê-la em face de pequeno envelope (8 cm x 11 cm), colocando em cima o tema. Dentro do envelope deverá colocar seu endereço, o pseudônimo e nome com a assinatura. O envelope devidamente fechado entregar ou mandar à Associação Paulista de Esperanto, escrevendo nele: Ano Internacional da Criança - Associação P. de Esperanto, Av. São João nº 1333, 2º/21 - CEP 01035 São Paulo (SP).



CONSELHO BRASILEIRO DE ESPERANTO

TESOURARIA

Caixa Postal 13-2086 - Fone: 243-5486

70.000 - Brasília (DF)

CONSELHO BRASILEIRO DE ESPERANTO

CGC 00 406 504/001 06 - Brasília

BALANCETE DE VERIFICAÇÃO

Em 30-06-79

DÉBITO

CAIXA

- Em Brasília (DF)	2.831,59	
- Em Santos (SP)	3.517,60	6.349,19

BANCOS

- Banco Nacional S.A. - Ag. Brasília (DF)		119.406,62
---	--	------------

BENS RECEBIDOS EM DOAÇÃO		860,00
--------------------------------	--	--------

IMPRESSOS E OBJETOS DE ESCRITÓRIO		300,00
---	--	--------

DESPESAS GERAIS		8.365,60
-----------------------	--	----------

DESPESAS C/CAMPANHA PRO SEDE PRÓPRIA		10.246,00
--	--	-----------

145.527,41

CRÉDITO

CONTRIBUIÇÕES PEGUNIÁRIAS, RECEBIDAS		7.640,00
--	--	----------

RENDAS DIVERSAS		800,00
-----------------------	--	--------

FUNDO PRO SEDE PRÓPRIA		128.000,00
------------------------------	--	------------

FUNDO SOCIAL		9.087,41
--------------------	--	----------

145.527,41

CONSELHO BRASILEIRO DE ESPERANTO

Carlos Augusto Siqueira da Cunha
Tesoureiro

CGC.30 43051 - S.DF 360

RIO DE JANEIRO (RJ)

Nia kara S-ano Sylvio Malheiros informis nin pri laboro kiun li faras lastatempe en sia regiono - Rio de Janeiro - cetero tre laŭdinda ĉar li vizitas ofte plurajn fakultatojn, kies direktoroj, unu post la aliaj, interesiĝas pri la internacia lingvo. Li faras prelegojn klarigante Esperanton, kiun malmal multe konas. Tiuj prelegoj elmontras la valoron de la lingvo kaj tio ebligas al multaj ĝelernantoj interesiĝi pri ĝia lernado, kio faciligas la enkondukon de ĝia instruado en tiujn fakultatojn, cetero permesata de la Ministerio por Edukado laŭ Leĝo 5.692/71, kiu transdonas

la kompetentecon al "Conselho Federal de Educação" la indikon de lernobjektoj por la komuna nukleo, de sfero nacia, tasko jam plenumita de la Konsilo sub n^o 853/71 kaj Rezolucio n^o 8/71 (Letero de la Ministerio al F. S. Almada, prezidanto de Brazilia Konsilantaro de Esperanto, sub n^o OF/GM/BSB 497/75, de la 26-a marto 1975).

Prof-ro Malheiros jam vizitis la fakultatojn SUAM-Sociedade Unificada Augusto Mota, SOUZA MARQUES, CELSO LISBOA, VEIGA DE ALMEIDA, INSTITUTO CYLENO, HELIO ALOYSO, etc., kies direktoroj fariĝis entuziasmaj pri Esperanto.

"SUDA STELO" EN RIO GRANDE DO SUL

En antaŭa numero de nia bulteno, ni asertis, ke la ŝtato Rio Grande do Sul, ekbrilis kiel kometo sur la esperanta ĉielo kaj ni ne troigis la veron. Ni ricevis la unuan numeron de la ĵus aperinta bulteno en tiu ŝtato "Suda Stelo", bonega propagandilo. La grupo de kompetentaj esperantistoj estas gratulinda. Ilia laboro estas notinda kaj ni esperas legi la 99-an numeron ankau de la ĵus aperinta informilo.

Ĝia direktoro, s-ano arkitekto kaj ĵurnalisto Ivo Sanguinetti, vicprezidanto de BKE, reaktivis firme. Lia laboro en la suda parto de Brazilo estas grava. Antaŭen gesamideanoj!

- x - x - x - x - x -

BARRA MANSA (RJ)

La gazetoj "O Líder" kaj "Integração" el tiu urbo, aperigis artikolojn, verkitaĵn de nia juna samideano Pedro Albeirici pri Esperanto kaj pri nia movado ĝenerale. S-ano Alberici estas entuziasma kaj kapabla esperantisto, certa nia futura gvidanto en Brazilo. Liaj verkoj estas preskaŭ poeziaĵoj. Li pravas, Esperanto estas poeziaĵo, preĝo aŭ io simila fakto. Ni gratulas al li kaj deziras sukceson.

- x - x - x - x - x -

VOLTA REDONDA (RJ)

En la Escola Municipal "Luiz Cantanhede" en tiu progresema urbo, de januaro ĝis junio finis la kurson: José Benedito Valentim Filho, João Carlos Cardoso Coradine, Lupercia Mendes, Maria Inês de Oliveira Lima, Fortunata Mattiazzo. La kurson gvidis la profesorino Ielem de Medeiros Tavares kaj profesoro Denir Lopes. Ni kore gratulas al la novbakitaj gesperantistoj kaj esperas ilin renkonti en Juiz de Fora en la venonta jaro.

- x - x - x - x - x -

PETRÓPOLIS (RJ)

Informis nin la prezidanto de Petrópola Esperanto-Klubo pri la fondiĝo de ĉi

tiu klubo kies unua estraro estas la sekvanta: Prezidanto: Laercio Klippel; vicprezidanto: Alberto Gustavo Ziehe; Ĉefsekretario: S-ino Zoé Portugal Kall; Helpsekretario: Luiz Carlos de Almeida; Ĉefkasisto: Gilberto Andrade Lopes; Helpkasisto: S-ino Elzenira Almeida Carneiro Klippel kaj Bibliotekisto: S-ino The-reza Bispo.

Ni dankas la informon dezirante al nova societo longan vivon kaj prosperon en la movado.

- x - x - x - x - x -

RIO GRANDE (RS)

Informas nin nia vicprezidanto Dirceu Porciuncula, ke estis starigita Rondeto pri praktikado de konversacio en la kadro de Esperanto Societo de Rio Grande, por la ĝelernantoj, kio okazos ĉiusabate, de la kvara ĝis la kvina posttagmeze.

- x - x - x - x - x -

BRASÍLIA (DF)

Laŭ la cirkulero n^o 1 de la monato majo 1979 la Brazilia Esperanto-Asocio vigne eklaboras. En la Spirita Federacio s-anoj Josias Barbosa kaj Francisco Mattos gvidos elementan kurson pri Esperanto.

La ĝenerala sekretario de BKE, s-ano Nelson Pereira de Souza gvidas superan kurson. Okazas diversaj prelegoj, kiujn prizorgas s-anoj D-ro Roberto P. Nogueira kaj D-ro Enivaldo Alves Silva.

La Societo havas bonegajn librojn en sia librovendejo. Baldaŭ estos dissendataj la listoj pri la vendotaj libroj.

- x - x - x - x - x -

CAÇAPAVA (SP)

S-ano Majoro Gilberto A. Silva Velho, bone konata, tre aktiva esperantisto en nia lando, senlace kunlaboras kun naciaj, internaciaj kaj esperantaj gazetoj. Li informas nin, ke en Garanhuns (PE) ekaktivis la Esperanto-Klubo en tiu urbo, kiu festas sian jarcenton. Ni gratulas!

La elektita direktoraro de tiu klubo estas: Prezidanto: S-ino Janilde B. de Oli-

veira; kasisto: S-ino Neuza Soares Bezerra de Mello; Disvastigado de Esperanto: Humberto Alves de Moraes kaj José Rodrigues.

La klubo funkcias en la strato Dr. José Mariane, 188. Ni gratulas al nova grupo de virinoj, kiuj honorigas pere de sia laboro nian movadon.

La enpostenigon de tiu estraro prezis nia vicprezidanto D-ro Mag. J. M. Mabezoone.

Ankaŭ informas nin Silva Velho, ke en Curitiba (PR) la movado vigligas. D-ro prof-ro Geraldo Matos, helpata de s-ano Olsen Bento Cruz instruas la lingvon al 20 gelernantoj. Ni deziras sukceson. Li diras, ke ankaŭ en Jundiaí (SP), en la komunuma biblioteko, funkcias kurso de Esperanto gvidata de s-ano Roberto Gomes Freitas. Gratulon!

Informas ankoraŭ nia vicprezidanto Silva Velho pri kunlaboro pri Esperanto kiun li faras sur gazeto "A Nova Era", el Franca (SP).

Silva Velho estas nia aktiva membro. Dank'al lia vigleco kaj kapablo, nia movado vekigas en pluraj urboj, kie jam de longe ne aktivis la samideanaro.

Li same klopodas fondi novajn societojn en diversaj ŝtatoj de Brazilo. Li, krom esti bona esperantisto, estas bona patrioto. Li sendis al ni belegan poeziaĵon pri la sanpaŭla flago, kiun ni publikas sube, homaĝe al Semajno de la Patrujo:

Bandeira de minha terra,
bandeira das treze listas!
São treze lanças de guerra
cercando o chão dos paulistas!

Prece alternada, responso
entre a cor branca e a cor preta!
Velas de Martim Afonso,
Sotaina do Padre Anchieta!

- x - x - x - x - x -

LAVRAS (MG)

Nia vicprezidanto Luiz Teixeira el tiu urbo, sendis al ni interesan sciigon. S-ino

Mirdza Burgomeister el Sovetunio skribis al li petinte havigi informojn pri la forpasinta s-ro Rudolfs Gustavs Libeks, el Litvujo, kiu loĝis en Lavras, sed mortis en Rio de Janeiro (RJ) en 1908. Lia filo ankoraŭ vivas en Lavras, kaj nun ekzamenante liajn paperojn, oni eltrovis, ke li estis esperantisto kaj verkis esperantan lernolibron.

S-ano Libeks estis unu el la esperantaj pioniroj en Brazilo, kune kun s-ano Valdomiro Lorenz, kiu en 1907 alportis Esperanton al Brazilo.

- x - x - x - x - x -

SALVADOR (BA)

Nia estimata vicprezidanto Sergio Silva Santos sendis al ni sciigon, ke komenciĝis novaj esperanto-kursoj en Salvador kaj ke en Alagoinhas la urbestro, s-ro Miguel Fontes, rezervigis du salonojn, por ke la profesoro Lucimar Magalhães kaj s-ino Aydê Amorim povu instrui tie la daŭrigan kurson.

Sam-ino Vivi Caymmi promesis partopreni nian kongreson en Juiz de Fora (MG) kaj la societanoj sin preparas por vojaĝi al Pan-Amerika kongreso en Argentino, venontjare.

- x - x - x - x - x -

ESPERANTO NOS CURRÍCULOS

O Departamento de Educação e Ciências da Inglaterra, respondendo a consulta do dr. M. Belmonte de Abreu "Fak-Delegito" da Associação Universal de Esperanto em PORTO ALEGRE, informou que, quanto ao ensino da língua Esperanto nas escolas da Inglaterra, não cabe à Secretaria de Estado nem ao Departamento, o poder de promover ou encorajar cursos particulares de estudo nas escolas.

O sistema descentralizado de educação adotado na Inglaterra, permite decisões relativas ao currículo, aos próprios professores, às autoridades educacionais e aos coor-

denadores do ensino local. Nessas circunstâncias, cabe às autoridades locais e escolas, examinar a evidência possível sobre o Esperanto e decidir por si mesmas se ele deve fazer parte do currículo.

Bom seria que esse sistema fosse estabelecido no Brasil, pois há muitos professores ansiosos por instituir o ensino dessa maravilhosa e útil língua no currículo escolar, pelo menos enquanto não se obtém a aprovação oficial dessa língua nas escolas.

Dr. Modesto Belmonte de Abreu
PORTO ALEGRE

- x - x - x - x - x -

PRI LA ESPERANTO-KLUBOJ

Forte ni staru, fratoj, amataj,
Por nia sankta afero!
Ni bataladu kune tenataj
Per unu bela espero!

L.L. Zamenhof

Ni staras antaŭ du jaroj de la plej brila kaj universala manifestacio de la esperantistaro, ĉiŝoje okazonta en la ĉefurbo Brazilja, la lastan semajnon de julio de 1981. Ni kredas, ke ĝi ja fariĝas marko por la enlanda kaj por la tutmonda Movado. Kaj ni ripetas la vortojn de s-ano Jan Smykalski, membro de Societo Lorenz (aliĝinta al BKE), el la lando de nia Majstro Zamenhof: "Laŭ mi, ĝi estas gandega espero je nova fluo de Esperanto en la Mondo, des pli, ke via lando estas tute alia, en kiu oni povos utiligi ĉiujn rimedojn (ne limigitajn!), kiuj pro diversaj kaŭzoj lamas en multaj aliaj landoj de la Mondo".

Antaŭ kelke da jaroj la brazilaj esperantistoj maltrankviliĝis pro la situacio de nia enlanda Movado, ĉar ekzistis malpaco inter la du landaj societoj. Ni ĉiuj multon ŝuldas al la senlaca laborado de s-ano Lazarus Brieger por trovi vojon al la interparado de la Estraranoj de la landaj societoj. Sed post la fondo de Brazilia Konsilantaro fariĝis paĝo inter la landaj societoj.

Tamen la lokaj kluboj ne estas fortaj kaj ne viglas, escepte de kelkaj. Tial nia atento koncentriĝu en ili, ĉar ili ja estas la bazo de nia movado. Kaj oni laboradu sur pluraj kampoj: informado, instruado kaj preparado de instruistoj, ĉefe, sed ankaŭ

en tiu de loka turismo kaj disvendado de libroj. Estas do vasta kampo, kaj ĉiu esperantisto ne povas neglekti la lokan movadon, ĉar sen ĝi ne ekzistas la tutlanda kaj la internacia. Tial ni metas la proponon antaŭ vin, kaj petas, ke vi ĝins ekzamenon kaj prenu vian decidon.

Fine, via loka Esperanto-Klubo estu via ĉefa celo en la poresperanta laborado. Se ankoraŭ ne estas klubo en via urbo, vi invitu aliajn samideanojn kaj kunfandu ĝin por pli bone permesi al vi laboradi por nia sankta afero.

Délio Pereira de Souza

- x - x - x - x - x -

KAMPANJO POR AĈETI SIDEJON AL BKE EN BRAZILJA:

Mono ricevita ĝis 15/VI/79

..... Cr\$ 111.000,00

Kotizoj ricevita ĝis 31/VII . 27.000,00

Novaj subskribintoj:

D-ro Wilson Deslandes 10.000,00

Waldemar Antonio Mendes . 10.000,00

Carlos Henrique Dionisio . . 10.000,00

Maria P. Almada 10.000,00

Edson da Costa R. Fonseca . 1.500,00

Luiz Teixeira da Silva 500,00

Mauro Libanio da Fonseca . 1.000,00

Gilberto A. Silva Velho . . . 1.000,00

Tuto 182.000,00

Mono kompromisita . . Cr\$ 200.000,00

Kotizoj kompletitaj 120.000,00

Sumo Cr\$ 320.000,00

Mono ricevota Cr\$ 138.000,00

Mono enkasigita Cr\$ 182.000,00

- x - x - x - x - x -

RIO GRANDE (RS)

S-ano Manoel Torres de Abreu sendis al ni gazeteltranĉaĵon el "Folha da Tarde", kiu publikigis artikolon de la prof-ro Epitacio Torres informante, ke Esperanto frakasis.

La 4-an de majo nia s-ano Abreu, delegito de UEA, skribis en la sama gazeto artikolon, responde al tiu jam citita.

La artikolo de s-ano Abreu estas klara kaj defendas la ekziston kaj progreson de la Zamenhofa idealo.

Bonega ago, kara s-ano Abreu, gravas, ke oni skribu, parolu kaj propagandu Esperanton. Gratuloni!